



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFOMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Épineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

MAJO - JUNIO

1962

3

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Majo - Junio

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeraj » kaj sendi ekzempleron de la revuo ^{al} gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO



Pri disbranĉigo de lingvoj :

La « Francpana » (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Vojaĝo tra Provenco (VII) - (Garrigue).

Tikla junulina demando (Pal Balkanyi).

El ie en la mondo :

Subtera riĉeco (P. Potin).

Intervjuo :

Kelkaj minutoj kun Raymond Schwartz.

Esperanto kaj Filatelio (J. Rousseau).

Fantaziaĵo :

La Feino (el la Fundamento).

Por via distro.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeraj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

La "Francpana"

La rezolucio akceptita de la Estraro de U. E.A., kaj, preskaŭ je la sama dato, la voĉdonado de la francaj Esperantistoj espereble metos finan punkton ĉe la tro longdaŭra kverelo pri la pasivaj participoj. Danĝera estas tiu kverelo ĉar ĝi ebligus disbranĉigon de nia lingvo. Se oni akceptus la uzadon de la pasivaj participoj tia, kia oni dezirus ĝin altrudi al ni, ni samtempe implice agnoskus la fiaskon de la Fundamento. Ĉar baldaŭ la hispan-, arab-, ĉin-lingvanoj kaj aliaj, proponus novajn ŝanĝojn, pretekste ke tiu aŭ tiu-ĉi punkto ne estas « logika », aŭ pli precize ne konforma al ilia propra nacia logiko. Se oni ne fermus la pordon, ĉiuj proponoj estus eblaj. Ĉiuj rajtus uzi sian propran esperanton.

Kiel ekzemplo de tiu danĝero mi prezentos al vi la « fragnot » (kiun oni povus traduki « francpana »), lingvaĉon parolatan de la Francoj kiuj loĝas en Argentino, miksaĵon de franca kaj hispana lingvoj.

Tiuj Francoj tute nature emas al uzado de hispanaj vortoj por signi aferojn, kiujn neniu franca vorto ekzakte difinas. Tio estas tute komprenebla. Sed anstataŭ konservi la hispanan vorton ili ĝin francigas.

Ekzemple la lavoŝtono (franclingve : *évier*) fariĝas « *pilette* » (hisp. : *pileta*), la benzino (franclingve : *essence*) fariĝas « *naphte* » (hisp. : *nafta*), ĉeesti (franclingve : *assister à*) fariĝas « *presencier* » (hisp. : *presencia*).

La dua stadio estas la rekta transpono de idiomismoj : « *Je devrais le mettre au courant* » (mi devus lin informi) fariĝas : « *je devrais l'enterrer* » (mi devus lin enterigi) pro la hispana verbo : *enterar* = *informi*. — « *Ma sœur est fiancée* » (mia fratino fianĉiniĝis) fariĝis : « *ma sœur est compromise* » (mia fratino kompromitiĝis) pro la hispana verbo : *compromedita* = *fianĉiniĝinta*. — « *Vos cadeaux étaient splendides* » (viaj donacoj estis belegaj) fariĝas : « *vos obseques étaient splendides* » (via enteriga soleno estis belega) pro la hispana : *obsequios* = donacoj. — « *Ma belle-mère est légèrement souffrante* » (mia bopatrino estas malsaneta) fariĝas « *Ma belle-mère est légèrement décomposée* » (mia bopatrino iomete putriĝis) de la hispana *descompuesta* = *malsaneta*...

La damaĝo ne estas tre granda kiam la « francpana » estas uzata nur en la ĉiutaga konversacio, sed granda ĝi estas kiam ĝi eniras la printitajn tekstojn. La francalingva gazeto « *Le Quotidien* » ricevas informilojn tiajn pri « *brosse légitime à manche anatomique* » (laŭlitere prava broso kun anatomia tenilo) anstataŭ « *brosse d'un modèle inédit à manche étudié pour un usage pratique* » (broso laŭ ankoraŭ neniam prezentita modelo kun tenilo tre oportuna).

Oni povus multigi la tiajn ekzemplojn, trovitajn eĉ en la tekstoj eldonitaj de la oficialaj oficoj.

Granda laboro estas farita nuntempe por konservi la korektecon de la franca lingvo, « *langue d'une grande potence* » (lingvo de granda pendumilo) de la hispana *potencia* = *potenco*).

Kio okazis pri la franca lingvo kaj verŝajne pri aliaj lingvoj, tio minacas Esperanton. Despli grava estas la afero pri Esperanto, ke la danĝero minacas ne la vortojn sed la gramatikajn regulojn, la Fundamenton.

Tia lingvo, kia Esperanto, parolata de diverslingvanoj, povas konservi sian unuecon nur dank'al respekto de neŝangeblaj reguloj eĉ se tiuj reguloj ŝajnas al kelkaj ne idealaj.

P. BABIN.

(La informoj pri « *fragnot* » estas eltiritaj de artikolo de S-ro André Rigaud en la revuo « *Défense de la langue française* »).

Esperanto tra la Mondo



Interŝango de sciencaj kaj teknikaj studaĵoj

Laŭ la modelo de la rondoj de « Graĵoj en Vento », la esperantaj sciencistoj aŭ teknikistoj povos publikigi siajn studaĵojn kaj informojn pere de kolektivaj regulaj kajaĵoj ; laboraĵoj de neesperantistoj povos ankaŭ esti tradukitaj kaj aperi en tiuj kajaĵoj mimeografitaj.

Skribi por informoj al S-ro Alberto Barrocas, Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo.

Esperanta kunveno dum Junulara Festivalo

Renkonto por esperantistoj okazos dum la « Festivalo de Junularo », en Helsinki (27-7 - 5-8). Sin turni al « Mondpaca Esperantista Movado », Finnlanda sekcio, Poŝtkesto-20025, Helsinki 4, Finnlando.

Belegaj infanaj bildlibroj

La eldona servo de la granda brita ĵurnalo « Daily Mail » publikigis en Esperanto, du belegajn bildlibrojn por infanoj, je prezo tre modera : « Bildlibro pri bestoj » (kun kolorbildoj) kaj « Amuzo per scienco ».

Filatelo

Okaze de la tutmonda filatela ekspozicio, kiu okazos dum aŭgusto en Prago, Ĉeĥoslovakujo, eldonis serion de poŝtmarkoj dulingvaj ; la dua lingvo de unu el tiuj poŝtmarkoj estas esperanto.

Dum la internacia kongreso de la esperantaj fervojistoj, en Majo, Hungarujo aperigis poŝtmarkon dediĉitan al tiu kongreso.

Cu vi volas korespondi kun siberianoj ?

En Omsk (okcidenta Siberio), funkcias diversaj esperanto-rondoj. Se vi volas korespondi kun esperantisto de tiu malproksima urbo, skribu al la respondeculo, S-ro V.V. Kulikov, Sazonova 33, Omsk 7, U.S.S.R.

U.E.A. translokiĝis

Meze de aprilo, estis inaŭgurita la nova sidejo de U.E.A. en Roterdamo. Jen la adreso : U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Septembro en Svisujo

De la 2a ĝis la 8a de septembro, internacia feriosemajno okazos sur la ĉarma Oberbalmberg (1024 m. s. m.), kun diversaj ekskursoj. Deta-

lan programon petu de Hans Kunkeler, Poŝtfako 417, Aarau (Svisujo).

Esperanto-klubo en Harvard-Universitato

Studenta Esperanto-klubo fondiĝis ĉe Harvard-Universitato (Massachusetts, Usono). Ampleksa ekspozicio estis prezentita en diversaj lokoj. Kursoj kaj studrondo funkcias.

En Germanujo

En Hamburgo, 20 esperantaj sciencistoj kreis Akademian Esperanto-grupon (jam Studenta rondo funkciis en la urba universitato).

En Francujo

La kultura semajno organizita de la Franca Unuiĝo en la Kulturdomo dum la Paskaj Fervojoj tre bone sukcesis. Prelegis 13 gesamideanoj. Partoprenis pli ol cent personoj el kiuj esperantistoj el Nederlando, Britujo, Pollando kaj Japanujo. U.E.F. antaŭvidas similan semajnon por la venonta jaro.

Popol-Universitatoj

La Internacia Renkontiĝo de Gejunuloj en Romo bone prepariĝas.

Okaze de la kultura semajno en Grésillon estis elektitaj el la 25 gejunuloj partoprenantaj la kvin reprezentantojn de la Franca Esperantistaro.

Internacia Ekzameno :

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Kopenhago. Skriba parto : la 2an de aŭgusto ; parola parto : la 3-an de aŭgusto. Sekretariino : F-ino Marjorie Boulton, 1 Ingfield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke on Trent, Anglujo.

Aŭstrujo

Nova turisma broŝureto pri « Malsupra Aŭstrio », kun enmetita Klarigfolio en Esperanto estas havebla de : Landesfremdenverkehrsamt Niederösterreich, Wien I, Herrngasse 13, Aŭstrujo.

Svedujo

Okazos de la 11-a ĝis la 17-a de Aŭgusto renkontiĝo por esperantparolantaj infanoj. Supra aĝlimo 14 jaroj — restado senkosta. Informoj : S-ino Martha Andreasson, Lilla Tolsered. Hisingers Karra, Svedujo


HIERAŬ

Tiu arbo estas almenaŭ miljara. Ĝi staras apud farmo en la departemento Lot-et-Garonne. Dum la Franca Revolucio ĝi estis utiligata kiel kaŝejo.



MORGAŬ

Laŭ la planoj de Paul Tournon, arkitekto, membro de la Franca Instituto, tiu konstruaro entenos 250 laborejojn disponigitajn al francaj kaj alilandaj artistoj. Ĝi staros en Parizo, malantaŭ la Urbodomo.



VOJAĜO TRA PROVenco

VII. - Avinjono kaj Monto Ventoux

De Aix ĝis Avignon, la vojo kondukas rekte, facile. Afabla kaj koketa, la « urbo sonoranta » prezentas al la vizitantoj la splendoron de siaj preĝejoj, mezepokaj monumentoj, kardinalaj loĝejoj, luksaj individuaj domoj de la XVIIa kaj de la XVIIIa jarcentoj, muzeoj, mallarĝaj zigzagaj stratoj, plenaj je allogo kaj pitoresko, kun ia italisma mieno, kaj, super ĉio, la aeran muzikon de mil sonoriloj. Sajnas kvazaŭ, trenante, la animo de la antikva urbo flirtus.

Sep papoj vivis en Avignon, dum sepdek jaroj, en la XIVa jarcento. Ili lasis du memoraĵojn : la remparojn kaj la papan kastelon.

Rimarkindan tuton formas la remparoj. Ili estas ovalaj. Ilia perimetro estas pli ol kvar kilometra. Por ilin bone viziti sufiĉas ĉirkaŭiri la urbon per aŭtomobilo.

La papa kastelo, unu el la plej mirindaj specimenoj de la gotika arkitekturo de la XIVa jarcento, staras en la urbo, restaĵo de la plej bela epoko de Avignon. Tiam, la urbo enhavis pli ol 100.000 enloĝantojn, riĉa, aktiva, svarmanta de kosmopolita popolo. La urbo en tiu epoko, vivis en stranga kontrasto. Ĝi konis samtempe la teruron de la pesto, de la malsatego, de la rabado kaj la splendoron de daŭraj festoj.

La alfluo de pilgrimantoj, la lukso de la palaco kaj de la papa kortumo, la religiaj festoj, la luksegaj akompanaroj de la princoj kaj de la reĝoj, tiu homamaso kaj tiu gloro igis Avignon la spirita ĉefurbo de la mondo. Ĝi havis la belan kromnomon « Franca Romo ».

Hodiaŭ, inter remparoj kaj Rodano, alia natura remparo, ĝi vivas kviete, urbo gaja, gastema, komerca, vigla.

Antaŭ ol forlasi Provencon, vizito trude prezentiĝas : al monto Ventoux (1912 m.), kiu estas unu el la plej famaj dank'al sia izoliteco, la imponeco de sia aspekto, la vasteco de la spacego, kiun ĝi superstaras.

Ni legu tiun belan tekston de Marie Maunron, nia amata kaj ŝatata provenca verkistino, kiu loĝas en la koro mem de nia regiono kaj kviete verkas. Ĉiu el ŝiaj libroj estas provenca perlo !

« Por posedi per vasta ĉirkaŭrigardo la ĝojan la reĝlandon Provenco, kiu etendiĝas de Rodano ĝis Alpoj, de Liono ĝis la maro, ni devas nur supreniri ĝis la supro de Monto Ventoux.

Cezaro, Bozono, la reĝoj-grafoj probable konis tiun ebriecon. Oni tie rimarkas, ke Provenco kaj Grafejo formas nur unu landon, etendiĝantan en sia splendoro diverseco apud sia dio : Ventoux. Estas necese supreniri en ĉiuj veteroj kaj en ĉiu sezono por bone vidi ĉiujn aspektojn kaj, se oni povas tiel diri, enpenetri ĝian animon.

En la nebulo, ĝi estas mistera, kiel figuranta genezo aŭ la abolicio de giganta mondo. Sub fulmotondro ĝi estas tragika kaj terura. La fumado aspektas naskiĝi el ĝiaj flankoj, reveni ĝis ĝi por ĝin travipi per siaj inferaj zigzagoj sub violeta ĉielo en la frakaso de la tondro, kiu centfoje eniĝas.

Batita de la ventego, ĝi estas laŭvorte freneza. Tial ĝi meritas sian nomon Ventoux ... monto de la vento ! — Kia vento : la Vento — si !!!

Izolata ĉe frunto de tiu ebenaĵo tiel larĝe malfermita sur la maro, ĝi ricevas senpere la blovojn varmajn kaj malsekajn de la maro, sed, ankaŭ, tiujn malvarmegajn kaj sekajn de la alpa nordo kaj de la okcidento, ĉiujn Lombardajn Rusiljonajn ventojn kaj Mistralon, la mastrovento, vera freneza rivero, kiu malsupreniras Rodanon kaj ĝin duobligas. La plej alta intermonto, kiu, turniĝante sur si-mem, donacas al vi la kulminon kvazaŭ portata en la ĉielo de la rokoj, estas nomata ekzakte : intermonto de la Tempestoj.

Tie la uragano atingas la epopeon. De la intermonto, jam, kaj poste de tie, alte, kia universo ! La ebenaĵo sub viaj piedoj iras profunden kaj tre malproksimen, tuŝas la ĉielon, borde de cirkonferenco, kies radiuso havas tri cent kilometrojn.

Tiu ebenaĵo similas tapeton broditan de ardoj kaj de ondumovoj, tie-ĉi rokaj, tie arbaraj, kie urboj kaj urbetoj similas florojn el perlamo- to kaj oro. La aŭtuno flamigas per luksaj nuanvoj. La vintro estingas la rufojn, la orojn, la vio- lojn kaj la brunojn, sed desegnas per karbokra- jono siajn senfiliigitajn arbojn kaj la lagetojn de

grandaj nigraj pinoj venintaj el la polaj bordoj. Vintra arbaro, nedirebla mirteatraĵo. La branĉaroj tranĉas mil ĉinajn desegnojn, nudajn, aspekte tiom fragilajn; la plej gracila el tiuj branĉoj koloretiĝas ofte per rozo kaj per malvo, laŭ volo de la varioj, sed baldaŭ, ornamiga per prujno kaj scintilas tial de ĉiuj fajroj de la prismo. Ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj aperos la neĝo, en flakoj, en lagetoj, poste en felto pli kaj pli densa, blindigas klare sed bluiĝanta ĉe la ombro. Ĉiu pinpungo havas sian preciozan kufon diamantitan. Jen la supro! Ĉi havigas novan miron: Alpoj norde; la maro je iliaj piedoj, la maro ĝis kabo Creux post Esterel kaj Maures; Cevenoj okcidente post la brila serpento Rodano, kiu rekondukas la vidadojn al la alpaj suproj, refermantaj la cirklon norde. Tiu serpento ligas ondigaĵe, ĉirkaŭprenas, ĉirkaŭprenas, poste forlasas Avinjonon, Taraskonon, Arleson, hele florumitajn, aliloke boskojn aŭ vilaĝojn, ĉiujn glorajn en la suno kaj la sorĉaj konstelacioj: estas granda Provenco de Cezaroj, proviziata de Grafejo...

Nu, ĉion, kio vivis sur tiu grundo, oni legas tie, broditan sur la tapeto, kiun ni povas

nomi kosma: la haoson elirantan el Diluvio, la ekaperon de la montaroj, ilian skuon kaj ilian ruinigon por tiu modlado, la naskigo de Rodano kaj de ĝiaj enfluriveroj.

Ĉio, ĉiuj, la naturo, la homoj estas sur tiu grandega areo, plantintaj, konstruintaj, konservintaj atestojn. Grekoj, Romanoj, Barbaroj, Maŭroj, poste la rabdetruantoj kaj la ekbruligistoj de ŝtiparoj, ĉio, ĉiuj markis per sia sigelo tiun elektitan provincon, tro ŝatatan kaj aviditan. Sed, se la alarmsonorado de Muret estis aŭdita, rekaptita de tiom da aliaj estas necese diri, ke de Vaucluse, de tiu blua disfendo formita de la fonto kaj de la valetto, levigas samtempe la ekzaltata kanto de Petrarko, rekaptita de la trobadoroj.

Ĉuu tiun tutan landon, kiun la supro de la monto antaŭtenas al vi kiel sunriĉan pokalon.

GARRIGUE.

Noteto. — Mi dankas mian amikon Paul Sareto, kiu konsciencie korektis miajn tekstojn.

TIKLA JUNULINA DEMANDO ...

Ĉu kaj kiel oni klarigu al ili la seksan vivon

Hungara pedagogia revuo aperigis artikolon, kiu konigas la rezulton de informado ĉe aro de lernantinoj, junulinoj, kiam kaj kiel ili eksciis ion pri la seksa vivo kaj kio estas ilia opinio pri tia informado.

Laŭ la statistiko nur ĉe 22 % informis ilin la patrinoj, la aliaj eksciis parte de amikinoj, parte laŭ hazarde aŭ kaŝe aŭskultitaj interparoloj. La konkludo estas, ke tio sensistema informado ne estas taŭga, eĉ ofte malutila. Pro tio parte ili ricevas tro allogajn sentojn, parte oni fremdigas ilin pri ĉia amrilato. Multaj el la pridemanditoj bedaŭris, ke ne iliaj patrinoj informis ilin konfide kaj amike, kaj ĝuste. Deksepjarulino plendis, ke pro misinformoj ŝia vivvojo flankeniris kaj nun de viro, kiu havas jam edzinon, ŝi ekkonis ĉiujn detalojn praktike.

Necesas do, ke la patrinoj mem ĝustatempe, singarde, sed malkaŝe kaj amikece informu siajn filinojn. Oni ne atendu, ĝis

aliaj — eble troige kaj nesobre — pripentras la aferojn! Sed nepre necesas, ke de infaneco estu pli sincera, pli rekta amikeco kaj fido, konfidenco inter la patrinoj kaj siaj filinoj, ĉar nur tio ebligas, ke la filinoj kun tiaj demandoj turnu sin unuavice en la familio.

La problemo certe estas simila en aliaj landoj, kion pravas kelkaj francaj kaj germanaj filmoj pri la gejunula libera vivo, kiujn ni povis vidi ankaŭ en hungaraj filmteatroj. La gepatroj ofte ne konscias pri sia respondeco!

Pàl BALKANYI, Budapest.

EL IE EN LA MONDO

Su' tera Ríceco

Vizito al la Senegalia Kompanio de Fosfatoj en Taïba

La Industrio, iom post iom, invadas la dezertojn! Ekzemple en Taïba, 20 kilometrojn de la urbeto Tivaouane, t. e. ĉirkaŭ cent kilometrojn oriente de Dakar.

Historie la malkovro de fosfatoj en Senegalio datigas de la lasta jarcento. Tamen, nur ekde dek du jaroj oni sisteme prospektoras la apudajn terenojn.

La minejaj rajtoj de la kompanio kovras vastegan regionon, kiu sendube entenas la plej ampleksan rezervaĵon de fosfatoj en Senegalio.


LA KUŜEJO. — Ĝi apartenas al vasta formacio, kiu entendiĝas ĉirkaŭ pluraj dekoj da kilometroj. La limoj de la nuna ekspluatado estis desegnitaj post multnombraj sondadoj, tiamaniere, ke oni ricevu nur minojn riĉan je 82 procentoj da fosfato.

La tavolo havas mezan dikecon de 6,50 metroj. Ĝi estas kovrita per relative novaj sablaj sedimentoj, kies profundeco mezuras de 15 ĝis 25 metroj.

Parto de la fosfata tavolo kuŝas sub la puta akvo (« freatika » akvotavolo).

La rezervaĵoj de la regiono nun ekspluatata atingas 40 milionojn da tunoj da minajo, riĉa je 82 %, tamen la eksplorinda regiono baldaŭ etendiĝos.

LA EKSTRAKTADO. — Oni komencis ĝin en marto 1960. Ĝi okazas subĉiele. La sablo estas forprenita de dragmaŝino 1250 B. Bucyrus Erié, kies trogo entenas 18 kub metrojn. Tiu elektra, aŭtomobila monstro pezas 1500 tunojn kaj utiligas potencon de 3.000 kilovatoj.



La kruda fosfato estas ekstraktata per alia dragmaŝino Bucyrus Erié 7 W, kun trogenhavo de 6 kubmetroj.

La repuŝitaj produktoj estas utiligataj por superŝuti la tranĉeojn faritajn de la dragmaŝino, kiuj uj pleniĝas je akvo. Sur floranta pontonego,

kiu sekvas la ekstraktilon, staras aparataro celanta al la dispartigo de la sterilaĵo elementoj mezurantaj pli ol 7 m. M. Per pumpoj, kun relasoj, oni suĉas la likvan miksaĵon ĝis la uzino.

LA TRAKTADO. — Ĉar la enteno de la erco varias laŭ la lokoj, oni devas uniforme pliriĉigi ĝin.

UNUE, oni senigas la minojn je neutilaj argilaj elementoj per « hidroĉiklono ».

POSTE, oni flosigas ĝin kun grasaj acidoj, subproduktoj de la hidrokarbura industrio. La siliceroj, la fer-kaj aluminoksidoj enprofundiĝas dum la altkvalita minajo surflosas.

La vasta, moderna uzino entenas multajn flankinstalaĵojn, ekzemple : filtrilojn, kiuj eliminis sufiĉe grandan kvanton da malsekeco antaŭ la lasta sekigo ; basenegojn por la rekuperado de la utiligitaj akvoj, k.t.p.

El Dakar la necesa elektra potenco estas provizata per 90.000 voltinoj konstruita de la Kompanio mem, kiu tiel disponas 20.000 kilovathorojn.

Planitaj por la traktado de 600.000 tunoj pojare, la instalaĵoj en Taïba ebligis iom post ioman kreskadon ĝis unu miliono da tunoj pojare.

La stokejo povas enteni pli ol 150.000 tunojn da malseka produktaĵo kaj ĉirkaŭ 15.000 tunojn da seka trikalcia fosfato, riĉa je 82 %.

LA TRANSPORTO KAJ ENŜIPIO. — Oni transportas la prilaboritan mineralon de Taïba al la Dakar-haveno per specialaj fervojoj kaj vagonoj, kiuj apartenas al la Kompanio.

En ĝiaj propraj haveninstalaĵoj 70.000 tunoj estas stokeblaj. Potencaj aparatoj ebligas la enŝipigon de 1.000 tunoj pohore.

La Dakar-haveno prezentas esceptajn eblecojn por la proviantado de ĉiuspecaj ŝipoj.

LA ESTONTECO. — Ĝi estos sendube frukto-dona. La altkvalito, la impona kvanto de la ekspluateblaj minajoj permesas esperi egan kreskadon kaj eĉ duobligon de la rezultoj ĉu financaj aŭ ekonomiaj.

S-ino POTIN.

(Laŭ dokumentoj afable pruntedonitaj de la Kompania Direktantaro).

..

Unu el la malamikoj en Taïba estas la vento, alia la polvo, do sufiĉe malproksime al la ekstraktejo, oni konstruas, meze de nove plantitaj, florantaj arbedoj, belan loĝaron por la industria kadroj.

Mi ankaŭ vizitis la sanitarejojn kaj parolis kun la afablaj Doktoro kaj flegistino pri la teknikaj aranĝoj. En tiu pavilono troviĝas ĉio necesa por rapida esplorado, pansaĵejo, radiografiaparato, k.t.p.

En apuda vilaĝo loĝas la indiĝenaj laboristoj.

Kvin kilometrojn norde de Taïba etendiĝas mirinda strando kun dunoj el blanka sablo. Sur la supro staras tipikaj kabanoj kun pintaj pajlaj tegmentoj. La oceano furiozas, tamen oni povas bani sin en la laguno kaj ripizi sub belaj arboj.

Ĉirkaŭ la uzino la montetoj el repuŝitaj sabloj nun anstataŭas la ebenajn.

Iom post iom la kreskanta verdaĵo tute ŝanĝos la aspekton de la pejzaĝo!

Taïba. Decembro 1961.

INTERVJUO

Kelkaj minutoj kun... **Raymond Schwartz**



« Plensanga sprita aŭtoro », « bardo de kanzonoj kaj kabaretaĵoj ». Per tiuj vortoj Ivo Lapenna prezentas Raymond Schwartz, la francan verkiston, en sia libro « La Internacia Lingvo ». Sprita, Schwartz ja estas : nur legu liajn verkojn : La Verda Testamento, Prozo Ridetanta, Anni kaj Montmartre, La Stranga Butiko, La Ĝoja Podio. Ne multe konata de la junaj esperantistoj ĉar ĉiuj liaj libroj elĉerpigis, Raymond Schwartz, la ironia bardo, partoprenis en la redaktadon de la ege serioza libro « Simpozio pri ata-ita ». Ni faris al li kelkajn demandojn, kaj li tute afable kaj, kompreneble, sprite respondis.

Mi unue faros la klasikan demandon : « Kiam kaj en kiuj cirkonstancoj vi fariĝis esperantisto ? »

En 1909. Unu el miaj tiamaj instruistoj sciis ion pri « universala lingvo, ankoraŭ nekonata ». Li havis la adreson. Mi tuj mendis lerno-libron, ĉar multe allogis min la stranga nomo Esperanto. Krome, tiuepoke, mi multe interesiĝis pri sekretaj lingvoj.

Vi verkis prozaĵojn kaj versaĵojn. Ĉu vi elektis unu aŭ la alian el tiuj esprimrimedoj ĉar tiu aŭ tiu-ĉi ŝajnis al vi pli trafa por esprimi viajn ideojn aŭ pensojn, aŭ nur ĉar pli plezurigis vin je iu momento la verkado de prozo ol de versoj aŭ inverse ?

Cio estis hazardo. Mi neniam cerbumis pri la « De kie kaj kien ? » de ĉiuj banalaĵoj.

Ĉu vi konsentas paroli iomete pri « Anni kaj Montmartre » ? Tiu romano kvankam mallonga estas majstre verkita sed bedaŭrinde ne plu trovebla. Kial venis al vi la ideo priskribi la apaĉan vivon ?

Pri Anni kaj Montmartre ? Inter 1925 kaj 1932 mi loĝis meze de la amuziĝanta Montmartre, rue Fontaine, kontraŭflanke de la kabareto de Josephine Baker. La noktoj tie estis ĉiam bruaj. Tio ne malhelpis min dormadi, kiel dormadas junage homo kun trankvila konscienco. Tamen, unu nokton ŝiris min el miaj sonĝoj akuta vekrio de virino : « Gustav ! Gustav ! » Certe germana junulino. Tra ŝia voko vibris

la emociiga malespero de persono tuj dro-nonta. Mi kredis kompreni, ke ŝi perdis sian kunulon kaj nun ĉirkaŭ ŝi amasiĝis la noktuloj de la kvartalo. Tio fariĝis la deirpunkto de mia romaneto.

Viaj verkaĵoj uzas ĉiujn eblojn de la lingvo por vortludo. Ĉu vi deziris montri tiujn eblojn aŭ nur ludi per vortoj ?

Vortludoj estas ĉiam bonvenaj atutoj en la Parizaj kabaretoj. Ĉar mia ĉefa Esp. aktiveco konsumiĝis en Esp. kabaretoj mi konformiĝis al la loka kutimo.

Estas necese aldoni, ke vi ne nur sprite kaj bonhumore uzas esperanton sed, ke vi batalas por defendi la unuecon de la lingvo. Sed ĉar ne ĉiuj legis la dikan « Simpozio pri ata-ita » kaj ankaŭ ne (almenaŭ la eksterlandanoj) vian lastan artikolon en « Franca Esperantisto », ĉu vi konsentas mallonge resumi vian opinion pri tiu problemo ?

De la momento, kiam la samaj vortoj ne plu havas la saman sencon por ĉiuj, estas senutile propagandi Esperanton. Kiel antaŭ nelonge skribis konata franca gazeto, l'Évasion Pénitentiaire, « en tiaj kondiĉoj Esperanto estos nur nova fonto de miskompreno inter la popoloj. Pli saĝe estus, se Esperanto ne enmiksiĝus en la internacian vivon, kie — ankaŭ sen ĝia kunlaboro — jam abundas konfuzoj kaj misinterpretoj ktp... ».

Esperanto estas evidente propagandebila nur surbaze de rigora unueco. Tion ni povas atingi nur dank'al nepra fideleco al la Fundamento, ne kiel ĝin interpretas kelkaj supersaĝuloj, sed kiel ĝin aplikadis Zamenhof mem dum sia tuta vivo.

Ĉu vi opinias, ke tiu ata-ita — batalo kondukas al skismo ?

La skismo ne okazos (aŭ ĝi estos nur sensignifa), ĉar la simplaj Esperantistoj « ĉe la bazo » havas pli da praktika senco kaj sento ol certaj lingvistoj, pli aŭ malpli improvizitaj, kiuj diskutadas « ĉe la pinto ». La rezolucioj akceptitaj preskaŭ unuanime de la Kongreso de U.E.F. montras la vojon irotan.

*Kion vi opinias pri tiu alià « danĝero »,
la neologismoj ?*

En la neologismoj mi vidas neniun danĝeron. Ili signifas eble « aldonon », sed certe ne « ŝanĝon » en la lingvo. Tiuj, kiuj estas necesaj estas... necesaj. La aliaj eliminigos per si mem. Estus relative facile formuli ĝustan difinon de « necesa neologismo ». La malfacilaĵoj komenciĝos, kiam oni volos pruvi, ke neologismo ne respondas al la difino pri neceseco. Ĉiuokaze nek unu, nek la alia havu civitraĵton en lernolibroj. Kaj estos bone, foje kaj foje, rememorigi al verkistoj, ke abundo de neologismoj ne povas kompensi la mankon de ideoj. Kiam oni disponas nur pri duonĉevala motoro, estas infanaĵo vesti sian aŭtomobilon per ĉiuj eksteraj akcesoraĵoj de Rolls Royce. Sed tiel longe, kiel la fan'oj (ne nova vorto, nur mallongigo de « fanatikuloj ») de neologismoj amuziĝos inter si, mi ne vidas iun danĝeron.

*Ĉu tiu partopreno en prigramatika kverelo
signas novan orientiĝon de via por-
per-esperanta aktivado ?*

Mia prigramatika aktivado estis nur hazardo. Se sur tiu kampo mi havus ambicion, ĝi konsistus el tio : simpligi ĝis ekstrema minimumo ĉiujn tro komplikitajn regulojn. Sed mi rimarkis, ke antaŭ mi jam iu alia faris tion multe pli brile ol mi povus. Kiam oni pripensas, ke Zamenhof sukcesis enŝovi en nur 16 regulojn la 414 paragrafojn de la Plena Gramatiko, oni povas nur mute admiri.

*Antaŭ ol vin danki mi dezirus scii, kaj
ankaŭ la legantoj de Kulturaj Kajeroj tute
certe, ĉu vi antaŭvidas la reeldonon de viaj
verkoj kaj la publikigon de aliaj.*

El miaj « verkoj » multaj pecoj malaktualiĝis. Ili restu en la tirkestoj de l'pasinta tempo. Aliaj povus iam aŭ tiam revidi la taglumon. Eble. Stafeto presadas nuntempe mian romanon « Kiel Akvo de l'Rivero ». Ĝi aperos verŝajne fine de tiu ĉi jaro.

EPIGRAMO

*Aŭtoro aŭtentika,
Ne nur versfare lerta
Sed ankaŭ gramatike
Samkiel majstro certa,*

*Publikis tiun frazon :
« Min ĉiuj tre estimas,
Ĉar mi en ĉiuj kazoj
Perfekte min esprimas. »*

*Sed kelkajn ĵaluzulojn
Ĉi tiu fraz' surprizis
Kaj ili ĝin skrupule
Ĝis fundo analizis.*

*Ĝi — sub ilia knedo —
Fandiĝis kiel vakso,
kaj sekvis la dekreto :
« Eraro de ...sin-takso ! »*

••

ALIA EPIGRAMO

*Tre konata recenzisto
Skribis foje en recenzen
Saĝan frazon, kies sencon
Fuŝkripligis la presisto.*

*Tiu fraz' aperis jene :
— (Aŭ almenaŭ proksimume,
Ĉar mi citas nur resume
Ne povante citi plene) —*

*« Nun ankoraŭ tre modestas
Niaj libroj kaj gazetoj,
Ĉar l'original-poetoj
Certe tro... malmutaj estas ».*

*Kaj legant' ne kompreninte,
Ke en tiu ĉi deklaro
Kuşas dika preseraro,
Diris grave : « Bedaŭrinde ! »*

(el « La Stranga Butiko » de R. Schwartz)

ESPERANTO KAJ FILATELIO

(Ci sube ni publikigas parton de la interesa prelego prezentita de S-ro Rousseau, en Grésillon, okaze de la Paska Kultura Semajno).



Kvankam mi parolos pri Poŝto kaj poŝtmarkoj, mia celo ne estos filatela. Mi nur volas atentigi vin pri la uzado de Esperanto farita de la Poŝto.

La unuan fojon, kiam vortoj en Esperanto aperis sur poŝtmarkoj estis en 1925. Tiujare, RUSUJO eldonis du poŝtmarkojn honore al Fizikisto POPOV kiu estis konsiderata en tiu lando — samkiel BRANLY en Francujo kaj MARCONI en Italujo — kiel la « *Inventisto de Radio* ». Tiuj tri lastaj vortoj esperantaj estas do la unuaj, kiujn oni povis legi sur poŝtmarko, kie ili estis la solaj, pli kompreneblaj eksterlande ol la samaj vortoj en rusaj alfabeto kaj lingvo! Estas interese noti, ke tiu unua uzado de Esperanto memorigis ne esperantistan aferon, sed celis al internacia konigado de iu homo « tutmonda ».

Kvin jarojn poste, Ruslanda Poŝto uzis denove esperanton sur du malsamaj poŝtmarkoj, ĉi-foje samtempe kun rusa lingvo : la unua montris la CENTRAN TELEGRAFEJON en MOSKVO kaj la dua HIDRAULIKAN STACION nomitan laŭ la nomo de LENINO.

En 1935, BRAZILO siavice eldonis poŝtmarkon uzante esperanton samtempe kun la portugala lingvo por informi la publikon pri la 8-a FOIRO PRI SPECIMENOJ, kiu okazis tiutempe en RIO DE JANEIRO. La sekvantan jaron, BRAZILO eldonis saman poŝtmarkon por la 9-a samspeca foiro.

Tiuj eldonoj estas la solaj sur kiuj tiuj du ŝtatoj donis la saman valoron al Esperanto, kiel al sia nacia lingvo, uzante la internacian lingvon por konigi ion sur internacia kampo.



Inter tiuj datoj (1925 1936) aliaj poŝtmarkoj estis eldonitaj, kiuj rilatis pli rekte al Esperanto. Unue ni parolu pri la memorigado de Kongresoj.

Ni revenu do al RUSLANDO : en 1926-a, SENACIECA TUTMONDA AMIKARO organizis en Leningrado, la 6-an INTERNACIAN PROLETAN KONGRESON DE ESPERANTO. Tiukaze, estis eldonitaj du poŝtmarkoj, kies bildo montras en la centro OBELISKON ; en la ovala kadro, kiu ĝin ĉirkaŭas, oni povas legi tekston en esperanto, sed pere

de la Morse-a alfabeto. Tiu teksto estas la famkonata frazo : « Proletoj el ĉiuj landoj, Unuigu ! ». Diskreta sed universala alvoko. Sendube tiu poŝtmarko estas la unua kaj ĝis nun unika poŝtmarko sur kiu oni uzis samtempe tiujn du internaciajn lingvojn.

En novembro 1936, BRAZILO memorigis la 9-an BRAZILAN ESPERANTO-KONGRESON per poŝtmarko, kies teksto estas nur en esperanto. Jen tiu teksto : « Naŭa Brazila Kongreso de Esperanto — nov/1936 — Rio de Janeiro » kiu ĉirkaŭas motivaĵon faritan el diversaj flagoj kaj en kies centro troviĝas la esperantista stelo.

En 1945, BRAZILO same memorigis la 10-an BRAZILAN ESPERANTO-KONGRESON per eldono de du poŝtmarkoj sur kiuj ankoraŭfoje la teksto estas en esperanto. Unu el ili montras abundokornon kaj la alia, vizagon de Doktoro ZAMENHOF.

En 1947, BULGARIO eldonis poŝtmarkon okaze de la 30-a JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO en PLOVDIV. Tiu poŝtmarko montras la mapon de la lando, sur kiu brilas verda stelo !

En 1949, AŬSTRUJO memorigis la ESPERANTO-KONGRESON en GRAZ per unu el la plej belaj poŝtmarkoj honore al la Internacia lingvo. La motivo de tiu smeraldkolora poŝtmarko estas granda stelo — insigno de tiuj, kiuj parolas Esperanton — kaj la nura vorto Esperanto aspektas kiel voko siafavore.

En 1953, la 38-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazis en JUGOSLAVIO, precize en ZAGREB. Tiukaze, la jugoslava poŝto eldonis serion de du poŝtmarkoj : la bildo montras verdan stelon superstarantan terglobon ĉirkaŭitan de banderolo konsistanta el la flagoj de la partonrenintaj landoj al tiu universala kongreso. Car JUGOSLAVIO zorgas ankaŭ pri parto de la regiono de TRIESTO, tiuj poŝtmarkoj ricevis surpreron, kiu valorigis ilin tie.

La 44-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en 1959 en VARSOVIO, ĉefurbo de POLLANDO kie naskiĝis D-ro Zamenhof 100 jarojn antaŭe (15-12-1859). La bildoj de tiuj poŝtmarkoj, kiuj memorigas tiun eventon montras la vizagon de Zamenhof kaj polan flagon kaj verdan stelon.



Ni turnu nun al tria aspekto de la rilatoj de la poŝto kaj Esperanto. Kelkaj landoj eldonis specialajn poŝtmarkojn, kiuj honoras aŭ memorigas pri Esperanto kiel Internacia Lingvo.

Denove estas Rusujo kiu eldonis, tian poŝtmarkon okaze de la 40-a datreveno de la kreado de Esperanto.

Okaze de la 50-a datreveno estis Brazilo, kiu memorigis tiun daton per poŝtmarko sur kiu oni povas legi « Ora Jubileo de Esperanto » kaj la datoj « 1887-1937 ».

En 1954, okaze de la kvindekjara datreveno de la enkonduko de Esperanto en Aŭstrujo, ties Poŝto eldonis memorigan poŝtmarkon, kies teksto estas nur en Esperanto : « 50 jaroj — Esperanto-movado en Aŭstrio ».

En 1957, la 70-a datreveno de la kreado de Esperanto estas memorigita de Bulgario per poŝtmarko sur kiu oni vidas panoramon de la malnova bulgara ĉefurbo TIRNOVO kaj la bildon de D-ro Zamenhof.


Samjare HUNGARIO eniris la rondon de ŝtatoj, kiuj per poŝtmarkoj rilatis kun la internacia lingvo. En tiu lando du poŝtmarkoj (aŭ pli precize 4, ĉar oni trovas ilin kun kaj *sen* dentoj) memorigis la 70-an datrevenon de Esperanto. La unua poŝtmarko montras du junajn vizaĝojn interparolantajn super tutmonda mapo kaj la vorto Esperanto aperas de unu buŝo al la alia. La dua montras vizaĝon de D-ro Zamenhof kaj lian subskribon.

Rilate al Zamenhof mem, nur POLLANDO BULGARIO kaj BRAZILo eldonis specialajn poŝtmar-

kojn por memori la centan datrevenon de lia naskiĝo. En Pollando tio okazis samtempe kiel la 44-a Universala Kongreso en Varsovio. En Bulgario, la poŝtmarko estis eldonita ekzakte la 15-an de Decembro kaj en Brazilo kun iom da prokrasto, la 6-an de Marto 1960.

Kiel ni vidis, pluraj ŝtatoj donis al la esperantaj memorigadoj la saman valoron, kiel al aliaj okazajoj, sed ankaŭ uzis la internacian lingvon kiel interkomprenilon internacian. Bedaŭrinde pluraj aliaj ŝtatoj ne akceptis ĝis nun la gravecon de la internacia lingvo por uzi ĝin siavice. Inter ili ni nomu nian propran landon! Tamen kelkfoje ĝi estus ege utila; kiam, ekzemple, la Eŭropaj ŝtatoj interkonsentas pri la eldono de poŝtmarkoj kun sama bildo por ĉiuj. Agante tiel, tiuj ŝtatoj deziras montri la identecon de opinioj kaj programoj celantaj al unueco de Eŭropo. Sed ili uzas la latinan vorton EUROPA (kvankam la plejparto ne estas latindevenaj) kaj indikas nomon de la lando kaj la valoro en la diversaj naciaj lingvoj. Saman ekzemplon oni povas trovi en Skandinavio, okaze de la TAGO DE LA NORDAJ LANDOJ; la belega eldonita poŝtmarko montras nur kvin cignojn kiuj ekflugas. Sed la ideo de izoleco kaj de progresema kooperado ne povis esti esprimita, ĉar oni ne akordigis pri la lingvo uzota! Oni do povas diri, ke tiuj poŝtmarkoj (Europa, Tago de la Nordaj Landoj) estas *mutaj* poŝtmarkoj.

Tio estas, miaopinie, la kontraŭo de la celo atingota !
Jack ROUSSEAU.



Nova mirindaĵo

Tiu bildo montras aspekton de movebla reflektilo de la radio-teleskopo, kiun oni povas vidi en Nançay (Francujo). Tiu radioteleskopo estas la plej potenca en la mondo.

FANTAZIAJO

La Feino

Iu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per siaj karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ siaj boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinojn, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon.

En iu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinkaĵon. « Tre volonte, mia bona », diris la bela knabino. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino: « Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon » (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la tormon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino). « Mi faras al vi donacon », gaŭrigis la feino, « ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ mulekosta ŝtono ».

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto, « Pardonu al mi, patrino », diris la malfeliĉa knabino, « ke mi restis tiel longe ». Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj. « Kion mi vidas! » diris ŝia patrino kun grandega miro. « Sajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! » « De kio tio ĉio venas, mia filino? » (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino). La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. « Se estas tiel », diris la patrino, « mi devas tien sendi mian filinojn. Maringo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estas al vi agrable havi tian saman kapablon? Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa vi-

rino petos de vi trinkaĵon, vi donos ĝin al ŝi ĝentile ».

« Estus tre bele », respondis la filino malĝentile, « ke mi iru al la fonto! » — « Mi volas ke vi tien iru », diris la patrino, « kaj iru tuj! ». La filino iris, sed ĉiam murmurante. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinkaĵon (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino). « Cu mi venis tien ĉi », diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, « por doni al vi trinkaĵon? Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinkaĵon al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki ». — « Vi tute ne estas ĝentila », diris la feino sen kolero. « Bone, ĉar vi estas tiel serve-ma, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano ».

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: « Nu, mia filino? » — « Jes, patrino », respondis al ŝi la malĝentilulino, eljetante unu serpenton kaj unu ranon. — « Ho, ĉielo » ekkriis la patrino, « kion mi vidas? ». « Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi! ». Kaj ŝi tuj iris por bati ŝin. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras. — « Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo ».

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pu grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, kaj forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edzigis je ŝi. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de ŝi; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte nenion, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.

El: « Fundamento de Esperanto ».

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

La 1961-62 konkurso nun finiĝis. La konkurstantoj laboras. La gajnintoj ricevos la rezultojn rekte. La listo aperos en la venonta numero de Kulturaĵoj Kajeroj.

Kaj en Septembro komenciĝos nova konkurso. Pretiĝu !

AMUZA) PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier)

Solve de la lasta problemo. — Kompletigaj multiplikoj :

Pro oportuneco ni anstataŭigu la punktojn per literoj.

$$\begin{array}{r} 66a' \\ b'a'' \end{array} \quad \begin{array}{l} a = 9 ; a' = a'' = 7 ; a' \times a'' = 49 \\ \text{la unua linio estas do : } 4669 \end{array}$$

$$\begin{array}{r} d66a \\ efc b \end{array} \quad \begin{array}{l} b = 8 - 6 = 2 ; a' \times b' = 7 \times b' = b ; \\ \text{do : } b' = 6 \end{array}$$

$$EDC89 \quad \text{la dua linio estas : } 667 \times 6 = 4002$$

Solve :

$$\begin{array}{r} 667 \\ 67 \end{array}$$

$$\begin{array}{r} 4669 \\ 4002 \end{array}$$

$$44689$$

$$\begin{array}{r} 857 \\ c'b'a' \end{array} \quad \begin{array}{l} a = 5 ; a' \times 7 = 35 ; a' = 5 \\ \text{la unua linio estas : } 4285. \\ 7 \times b' = 21 ; b' = 3. \\ \text{la dua linio estas : } 2571 \\ c + c'' + g = 2 + 7 + g = 12 \\ g = 12 - 9 = 3 \\ c' \times 7 = 53 ; c' = 9 \\ \text{la tria linio estas : } 7713. \end{array}$$

Solve :

$$\begin{array}{r} 857 \\ 935 \end{array}$$

$$\begin{array}{r} 4285 \\ 2571 \\ 7713 \end{array}$$

$$801295$$

NOVAJ PROBLEMOJ

Onklo kaj nevo : Ĉu du viroj povas esti samtempe onklo kaj nevo unu de la alia ?

Ŝafistoj kaj ŝafoj : Du ŝafistoj Petro kaj Paolo, posedas kune 211 ŝafojn. Petro vendis 13 ŝafojn al viandisto kaj donacis 5 ŝafojn al Paolo. Ili havas nun saman nombron da ŝafoj. Kiom da ŝafoj posedas ĉiu el ili antaŭ la vendo kaj la donaco ?


PRINCO KARNAVALO ALVENIS




Vi trovu la ok diferencojn, kiuj ekzistas inter la du bildoj.

Solve en la venonta numero

BONHUMORO




Vi ektimis, ĉu ne ?



Mia kamarado havas rendezuon




Mi opinias ke estas dece foriri



Mi esperas, ke oni ne vidos, ke ĝi ne estas mia

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark.).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso C. Galilei, 22, TORINO.
- Jugoslavio** : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul. Petefij eva 27, ZRENJANIN.
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).
- Svedujo** : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).
- Svislando** : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo